

## LABORRAPORTO DE LA ESTRARO DE MEKSIKA ESPERANTO-FEDERACIO KAJ RAPORTO PRI ESPERANTO EN MEKSIKO JANUARO – DECEMBRO 2011<sup>1</sup>

### **ENKONDUKO**

Tiu ĉi dokumento estas la laborraporto de la MEF-estraro, ĝi enhavas kion nia teamo<sup>2</sup> celis, faris kaj atingis en 2011, sed en ĝi ankaŭ troviĝas informoj pri diversaj agadoj de la ĝenerala publiko kaj de pluraj aliaj esperantistoj. Tial, per tiu ĉi verko oni havos ĝeneralan superrigardon pri la meksika Esperanto-movado dum 2011.

Kiel referenco ni prenis la laborplanon de MEF (2008-2012), en kiu la ĉefaj laborkampoj estas; informado, instruado / klerigado kaj utiligado.

### **1. INFORMADO**

La informa agado estis plenumita je diversaj kampoj kiel la jam konata ĉefa retpaĝo [www.esperanto-mexico.org](http://www.esperanto-mexico.org), la instalado de retpaĝo de MEF ĉe Facebook kaj de la grupo Esperanto-Mexico en la sama socia reto. Komunikadoj, standoj / flugfolioj, afiŝoj, informprelegoj, gazetaro kaj televido ankaŭ estis parto de la informado.

#### ***A) Ĉefa retpaĝo – retpaĝo de MEF ĉe Facebook - grupo Esperanto-México ĉe Facebook***

Atenti pri la konstanta kontrolo de la virtualaj informiloj estis nepre por ni, ĉar ili estis la plej efikaj kaj malmultekostaj amasinformiloj.

La jam konata ĉefa retpaĝo de MEF (Bildo 1) daŭre funkciis dum la tuta jaro, per ĝi la homoj povis legi, preskaŭ ĉiam en Esperanto kaj hispane, informojn pri naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj, kursoj, turismaj informoj, turismo, ktp.

Ĝian teknikan prizorgadon atentis Boris Legault kaj Martin Schäffer. En la verkado kaj / aŭ tradukoj de informoj, artikoletoj, novaĵoj kontribuis Ulises Franco P., Carlos Hernández L. David López, Edgar López, Mallely Martínez, Morayma Martínez, Daniel Moreno kaj Martin Schäffer.

---

<sup>1</sup> Tiu ĉi dokumento estis verkita de Mallely Martínez Mateos, prezidantino de Meksika Esperanto Federacio, kontrolita kaj aprobata de la sekvaj MEF-estraranoj: Daniel Moreno Martínez, ĝenerala sekretario, Morayma Martínez Mateos, kasistino, David López Rueda, membro.

<sup>2</sup> Ni nomas "teamo" al la tuta membraro, kiu diversmaniere apogis la laboron en la meksika Esperanta movado.

Aliflanke, ĝi estis unu el la plej gravaj kontaktiloj inter ni kaj homoj, kiuj interesiĝis pri la lingvo. Venis mesaĝoj al la retadreso publikitaj en “kontaktoj kaj grupoj” de la sekvaj urboj lokiĝitaj en diversaj partoj de la lando: Cancún, Chapingo, Chetumal, Chihuahua, Distrito Federal, Monterrey, Morelia, Puebla, Querétaro, San Luis Potosí kaj Tuxtla Gutiérrez. Niaj lokaj kontaktoj,

esperantoparolantoj de tiuj urboj, respondis la demandojn kaj ofertis helpon por enkonduki ilin en la Esperantan mondon. Multan dankon pro via kontribuo!!!!

La retpaĝo de MEF ĉe Facebook (Bildo 2) ekfunkciis en julio 2011 per administrado de Martha Cárdenas, Carlos López kaj Martin Schäffer, sendube ĝi multe helpas malfermi pordojn al esperantoparolantoj meksikaj kaj



Bildo 1. Esperanta versio de la retpaĝo de MEF 2011, “Renkontiĝoj (internaciaj)”

eksterlandaj, kiuj interesiĝas pri la nacia movado. Je la fino de 2011 ni havis 159 “mi ŝatas” el 20 landoj. Ofte en ĝin ni metas ligojn, kiuj direktas la homojn al la ĉefa paĝo de MEF.

Kvankam la grupo “Esperanto-Mexico” ĉe Facebook (Bildo 3) malfermiĝis en 2010, ĝi nur vere ekaktivis dum la lasta jaro, iom post iom pli kaj pli da homoj integriĝas kaj kontaktas aliajn meksikanojn por praktiki la lingvon per tiu tuja virtuala komunikilo, en la fino de la lasta jaro estis 42 membroj, ĉefe el Meksiko, tamen ankaŭ estis homoj de landoj kiel Brazilo, Ĉeĥio, Francio, Italio, Kanado kaj Kolombio.

MEF ankaŭ profitas tiun paĝon por informi pri renkontiĝoj kaj novaĵoj. Kvankam la ĉefa lingvo uzata tie estas Esperanto, la partoprenantoj de tempo al tempo krokodilas sed ĉefe kun esperantaj celoj.




Bildo 2. Retpaĝo de MEF ĉe facebook, 2011



Bildo 3. Grupo ĉe facebook “Esperanto – Meksiko en 2011

## B) Informagadoj: komunikadoj, informprelegoj, flugfolioj, afiŝoj,

En februaro 2011 okazis la Monda Socia Forumo (MSF) en Dakaro, Senegalio. En kiu partoprenis, kiel Esperanta reprezentanto, Mirejo Grosĵan el Svislando. Meksika Esperanto Federacio partoprenis: 1) sendante al Grosĵan informilojn pri Esperanto en la hispana, tiun ĉefan flugfoliojn, kiun ni uzas por informi pri la lingvo lande kaj 2) George Baker, tiama MEF-membro el Usono tradukis de la angla al Esperanto signifojn de afrikaj simboloj “*Adinkra*” (Bildo 4), komunaj en pluraj kulturoj kaj civilizacioj de la oriento de la kontinento, kiuj reprezentas filozofiajn aŭ



Bildo 4. Retpaĝo en Esperanto de *Ciranda Internacjonal*

religiajn pensojn. Estroj de *Ciranda Internacjonal* rilatigis tiujn simbolojn al ĉiuj aksoj de la Forumo en 2011, en ĝia retpaĝo ni povas legi: “ĉiu el la 12 temaj aksoj de la MSF havas sian propran simbolon...”. Mallely Martínez M. estis la peranto inter la tradukinto kaj la ĵurnalistoj.

La ĉefa celo de tiu publikaĵo estas ke en tiu paĝo aperas informoj en sep lingvoj, do homoj povas rimarki ke la Internacia Lingvo ankaŭ tie estas kaj havas gravan rolon por la internacia informado.

Ekde 2011 Esperanto ĉeestas en PREPA 7 de la Nacia Universitato Aŭtonoma de Meksiko (UNAM), tio per la influo kaj laboro de Javier Vásquez O. ĉar en tiu jaro li alproksimiĝis al estro de “Mediateca” por peti inkludi Esperanton inter la tieaj retaj lerneblaj lingvoj. Por

diskonigi la aferon Vásquez prelegis en marto dufoje por informi pri la lingvo kaj la servo. Prezidantino de MEF kaj Martin Schäffer akompanis lin por apogi kaj montri materialon al la junuloj.

Ankaŭ en UNAM, en ĝia Jura Fakultato, Luis Córdova Arellano aranĝis informprelegon pri Esperanto kun la celo inviti homojn al la tieaj kursoj, kiel prelegantoj ankaŭ partoprenis Eleonor Cortés L., Mallely Martínez M. kaj Martin Schäffer. Multaj studentoj (Foto 1) vizitis la prelegon kaj tiam iuj aliĝis al la kurso.



Foto 1. Informprelego antaŭ studentaro de la Jura Fakultato de UNAM



Foto 2. Carlos Hernández, Sergio Romero kaj JoMo dum prelego.

Septembre, en la Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro okazis informprelego gvidata de Carlos Hernández L. kaj Sergio Romero A (Foto 2). Ni profitis la viziton al nia lando de la konata kantisto “JoMo” el Francio por aranĝi la prelegon kaj inviti la studentojn al koncerto de la franco tuj post la informado. Partoprenis granda kvanto da studentoj ne nur de la Fakultato pri Lingvoj sed ankaŭ de aliaj.

Oktobre ankaŭ en UAQ, aktivuloj de Querétaro partoprenis en ĝia Kultura Semajno, en kiu ili disdonis flugfoliojn, preparolis la lingvon al interesitoj, montris diversan materialon kaj geknaboj de la Kuirado-kariero faris kelkajn bongustajn manĝaĵojn por vendi (Foto 3)<sup>3</sup>

Indas menciigi ankaŭ ke aliaj membroj de la asocio kaj meksikaj aktivuloj disdonis flugfoliojn kaj informilojn en diversaj edukaj kaj kulturaj institucioj, tio signifas ke, la agado ne nur okazis en la supre menciitaj institucioj.



Foto 3. Aktivulo el Querétaro montrante la E-budon dum la Kultura semajno, en UAQ.

### C. Gazetaro – televido

Rilate al la ekstera gazetara informado aperis 2 publikaĵoj en la hispana kaj unu el ili uzis iom da Esperanto en la publikaĵo. La artikoltitoloj kaj ĵurnaloj estas:

1. Esperanto ¿Uno de tantos inventos?, de María Cristina Rosas en la ĵurnalo “*Etcétera*”: la artikolo estas ege interesa kaj enhavas multajn gravajn informojn pri la lingvo, je la fino estas komentoj de kelkaj personoj, preskaŭ ĉiuj estis pozitivaj. Jen la rekta ligo al la artikolo: <http://www.etcetera.com.mx/articulo.php?articulo=7487>
2. La Federación Mexicana de Esperanto en Querétaro, de la ĵurnalo “*Ketzalcoatl*”, la artikolo raportis pri la 7<sup>a</sup> semajnfina meksika renkontiĝo okazinta en la urbo Querétaro (Bildo 5).

<http://ketzalcoatl.cultura.wordpress.com/2011/04/12/la-federacion-mexicana-de-esperanto-en-queretaro/>

### La Federación Mexicana de Esperanto en Querétaro



El pasado 2 y 3 de abril se reunieron en la Ciudad de Querétaro, el Grupo de Esperanto y la Federación Mexicana de Esperanto con el objeto de estrechar lazos entre sus miembros.

Bildo 5. Parteto de la artikolo en “Ketzalcoatl”

<sup>3</sup> Informojn kaj fotojn pri la Kultura Semajno en UAQ, mi prenis de raporto de Carlos Hernández sendita al MEF en oktobro 2011.



Rilate al la televida informado; studentoj de la altnivela edukinstitucio pri ĵurnalismo “Carlos Septián García” faris intervjuon pri Esperanto al Luis Córdova A (Bildo 6), ĝi daŭris proks. horo kaj la publiko povis scii pri la movado nacia kaj internacia, kvankam ĝi okazis je la fino de 2010, ĝia apero estis en 2011.

Entrevista a Luis Cordova sobre el Esperanto (2011)



Bildo 6. Intervjuante al Luis Córdova

Marte de la sama jaro en Mérida, Yucatán, sudokcidente de la lando, Alfredo Sotomayor kaj Alberto Arvizu intervjuis al Mallely Martínez kaj Martin Schäffer pri la Internacia Lingvo en la programo nomata “Coordenadas de Comunique Chanel”. En la sama programo akompanis la intervjuatojn la majaa verkisto Isaac Carrillo, kiu gajnis la premion “Nezahualcóyotl 2010” de literaturo en meksikaj lingvoj per la verko nomata “dancoj de la nokto”.

## **2. KLERIGADO**

### **A) Ĉeestantaj kursoj**

Inter januaro kaj decembro 2011 ni ricevis informojn pri 24 ĉeestantaj kursoj (Tabelo 1), en kiuj estis pli ol 250 gelernantoj. Denove la plej gravaj pro ĝia oficialeco estis la donitaj en la fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC) kaj ankaŭ tiuj de la aliaj du universitatoj: la Aŭtonoma de Meksiko kaj la Aŭtonoma de Querétaro.

Ni ne forgesu tamen la gravecon de ĉiuj aliaj kursoj, la penadon kaj dediĉon de ĉiu instruinto / instruisto de Esperanto dum 2011, per ili fariĝas novaj esperantistoj en diversaj institucioj kaj urboj.

Indas menciigi ke komence de la jaro tri meksikanoj prezentis ekzamenon pri Esperantaj konoj kadre de ILEI kaj dum la 11a Meksika Esperanto-Kongreso en Guadalajara denove okazis tia ekzameno en kiu aliĝis 5 personoj. De tiuj ok homoj, kvin instruis / instruas la Internacian Lingvon, tio ege bonas ĉar por altigi la kvaliton de la E-instruado, nepras ke la instruantoj – instruistoj havu bonan E-nivelon. Ni invitas la homojn prezenti tiajn kaj / aŭ ekzamenojn kadre de la Komuna Eŭropa Referenckadro.

Flanke de MEF, dum 2011 ni donis atestilojn al 118 gelernantoj de ĉeestantaj kursoj de la urboj: Distrito Federal, Guadalajara kaj Tecámac.

Tabelo 1. Ĉeestantaj kursoj de Esperanto dum 2011 en Meksiko

#	Dato	Institucio / Instruloko	Tipo / horoj	anoj	Urbo	Nivelo	Instruist(in)o
1	4a- 25a januaro	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC)	Intersemestra Oficiala / 64h	10	Mexicali	A1-A2 laŭ KER	Gilda Muñoz Bonilla
2	29a jan – 14a maj	Centro pri Kabalaj Studoj (CEDEK)	Libervola / 30h	28	Ĉefurbo	A1 laŭ KER	Mallely k. Morayma Martínez Mateos
3	31a jan – 25 <sup>a</sup> maj	Fakultato pri Lingvoj de (UABC)	Semestra oficiala / 64h	11	Tijuana	A1-A2 laŭ KER	Gilda Muñoz Bonilla
4	5a feb – 14a maj	Centro pri Kabalaj Studoj (CEDEK)	Libervola / 30h	20	Ĉefurbo	A1 laŭ KER	Mallely k. Morayma Martínez Mateos
5	19a feb – 21a maj	Vartejo Cuauhtémoc	Libervola / 25h	10	Guadalajara	Komencanta	Edgar López B., Ulises Franco P.
6	5a mar – 9a apr	Jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM)	Libervola / 18h	28	Ĉefurbo	Komencanta	Luis Lorenzo Córdova Arellano
7	14a mar -	Universitato Aŭtonoma de Chapingo	Libervola / 75h	8	Chapingo	Komencanta	Víctor Iván Sombra Argüelles
8	16a maj – 11 jul	Suboficejo de Meksika Esperanto Federacio	Libervola / 20h	7	Tecámac	A2 laŭ KER	Mallely Martínez M.
9	21a maj – 20 aŭg	Centro pri Kabalaj Studoj (CEDEK)	Libervola / 30h	24	Ĉefurbo	A1 laŭ KER	Mallely k. Morayma Martínez Mateos
10	21a maj – 20 aŭg	Centro pri Kabalaj Studoj (CEDEK)	Libervola / 30h	38	Ĉefurbo	A2 laŭ KER	Mallely k. Morayma Martínez Mateos
11	29a maj – 10 jul	Privata kurso	Libervola	?	Ĉefurbo	A1 laŭ KER	Javier Vásquez O.
12	30a maj – 11 jul	Suboficejo de Meksika Esperanto Federacio	Libervola por infanoj / 14h	4	Tecámac	Komencanta	Mallely Martínez M.
13	Junio 2011	CPH - Mexicali	Libervola	?	Mexicali	komencanta	Rubén Feldman G.
14	4a jun – 20a aŭg	Vartejo Cuauhtémoc	Libervola / 25h	4	Guadalajara	Komencanta	Edgar López B., Ulises Franco P.
15	4a jun – 20a aŭg	Vartejo Cuauhtémoc	Libervola / 25h	6	Guadalajara	<b>Komencinta</b>	Edgar López B., Ulises Franco P.
16	5a jun – 3a jul	Suboficejo de Meksika Esperanto Federacio	Duonintensa libervola / 20h	4	Tecámac	A1 laŭ KER	Mallely Martínez M.
17	8a aŭg – 25a nov	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC)	Semestra oficiala / 64h	16	Tijuana	A1-A2 laŭ KER	Gilda Muñoz Bonilla
18	8a aŭg – 25a nov	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC)	Semestra oficiala / 64h	6	Tijuana	A2-B1 laŭ KER	Gilda Muñoz Bonilla
19	3a sep– 10a dic	Centro pri Kabalaj Studoj (CEDEK)	Libervola / 30h	17	Ĉefurbo	A2 laŭ KER	Mallely Martínez M.
20	3a sep– 10a dic	Centro pri Kabalaj Studoj (CEDEK)	Libervola / 30h	21	Ĉefurbo	A2 laŭ KER	Mallely Martínez M.
21	3a sep– 5a dic.	Suboficejo de Meksika Esperanto Federacio	Libervola / 25h	6	Tecámac	A2 laŭ KER	Mallely Martínez M.
22	26a sep– 3a dic.	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ)	Oficiala / 30h	12	Querétaro	Komencanta	Carlos Hernández Loarca
23	sep-dic	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ)	Oficiala / 36h	4	Querétaro	Komencanta	Carlos Hernández Loarca
24	Jan – dec	Kurso, "Asociación de Jubilados y Pensionados del Poder Judicial Federal, A.C."		?	Ĉefurbo	Komencanta <b>Komencinta</b>	Sofia Carbot Rodríguez

## B) Retaj kursoj

Rilate al la interretaj kursoj, kiel en diversaj partoj de la mondo, en Meksiko estas relative granda kvanto da personoj, kiuj lernas Esperanton tiele, ĉefe en lokoj, en kiuj ne eblas lerni la lingvon alimaniere.

Tiuj instruiloj tamen ankaŭ tre bone utilis por tiuj, kiuj lernis en ĉeestantaj kursoj. La virtualaj kursoj plej uzataj de la meksikanoj estas:



Lernu.net



Kurso de Esperanto



Esperanto en 10  
lecciones



Livemocha

## 3. UTILIGADO

Unu el la plej gravaj aktivecoj de ĉiu E-movado estas kiel la homoj uzas la lingvon. Renkontiĝoj ege gravas ne nur pro praktikado de la lingvo, sed ankaŭ por pripensi novajn planojn kaj tiel antaŭenigi la movadon, fari teamojn kaj plifortigi la laborfortojn.

- 1) Renkontiĝoj okazis en diversaj partoj de la lando dum 2011, plej aktivaj estis esperantoparolantoj de Distrito Federal, Guadalajara kaj Querétaro sed ankaŭ estis kunvenoj en Monterrey, Tecámac kaj Toluca.
- 2) Je la 2<sup>a</sup> kaj 3<sup>a</sup> de aprilo okazis en Querétaro la 7a Semajnfina renkontiĝo en la lando. Partoprenis personoj el naŭ urboj. Dum ĝi prezentis sin la grupo "Esperétaro", ni kune manĝis, ludis kaj konis la urbon grupe per ĉiĉeronado de Sergio Romero. Kiel menciite en antaŭaj paragrafoj, bone estas ke vizitis nin ĵurnalisto de "Ketzalcoatl", kiu poste verkis kaj publikigis artikoleon pri la evento.
- 3) Maje 2011 du meksikanoj, Carlos Hernández L. kaj Malinalli García G., akiris stipendion por partopreni Seminarion, kiun organizis Skolta Esperanto Ligo kaj TEJO. Por ambaŭ uloj, ĝi estis la unua E-partopreno eksterlande, revenante Hernández esprimis: "...mi scias ke Esperanto funkcias... en la tuta mondo, kaj ke multaj homoj estas sampensantaj estaĵoj. Mi scias nun ke la ideo kaj celo de la Internacia Lingvo tute eblas..."

4) En septembro 2011, pli precize inter la 16-a kaj 18-a okazis la 11-a Meksika Esperanto-Kongreso (MEK) en la urbo Guadalajara, ĝin ĉeestis 45 homoj el 4 landoj. 11 meksikaj ŝtatoj estis reprezentitaj, el eksterlando partoprenis: Duncan Charters (ILEI-vicprezidanto, Usono), Georgo Handzlik (muzikisto kaj aktoro; Pollando) kaj Jean-Marc Leclercq (JoMo, muzikisto el Francio).

La kongresa temo estis: "La instruado de Esperanto en Meksiko; malfacilaĵoj, defioj kaj proponoj". Ni povis sekvi multajn bonkvalitajn prelegojn, kiuj rilatis al la kongresa temo. Dum la kongreso fondiĝis oficiale meksika ILEI-sekcio, kies prezidanto iĝis la juna Esperanto-instruisto Carlos Hernández L. el Querétaro, elektiĝis dumkongrese ankaŭ nova estraro de Meksika Esperanto-Junularo (MEJ), ĝin ekestris Sergio Romero A. kiu ankaŭ loĝas en



Foto 4. Grupa foto post "Arta Vespero" en la Casa de la Cultura Jalisciense.

Querétaro.

Bonŝance ni havis la apogon de la "Casa de Cultura Jalisciense" por okazigi la artan vesperon, tiel aliaj homoj povis ĝui ĝin. En tiu kongresero partoprenis diversaj E-parolantoj: Armando Hernández T., Leonardo Jauregui S., Gabriel Jiménez R., Ana Lilia López D. kaj JoMo (Foto 4). Pri la 11a MEK aperis artikolo en La Ondo de Esperanto, en ĝia novembra numero de 2011.

La kompletan raporton pri la 11a MEK vi trovos ĉe <http://www.esperanto-mexico.org/files/enerala%20kongresraporto.pdf>

## 4. MEMBRARO

Dum 2011, kompare al 2010, la membraro de MEF kreskis de 82 al 166 anoj kaj de tiuj, la triono estas junuloj. Tiu kresko ĉefe okazis pro la aliĝo de novaj membroj, kiuj lernis en ĉeestantaj kursoj. Ni invitas varme la homojn, meksikanojn kaj eksterlandanojn, aliĝi al nia teamo, laborante kun ni, helpante per mono, disvastigante la lingvon!

Meksiko, septembro 2012.